

eLIBRO

Makedonaj perloj

*Cent kvindek
popolkantoj*

I N K O

MAKEDONAJ PERLOJ

Cent kvindek popolkantoj

La kantojn elektis kaj enskribis
Ljuben Dimkaroski; tradukis en
Esperanton Nikola Stranĝanski.

La presitan libron eldonis
Esperanto-societo "La Progreso",
Prilep 1998.

(ISBN 9989-712-87-5)

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-147-X

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

APRILIO 2002

Enkonduko

La neceseco eldoni tiun ĉi popolkantaro estas evidenta. La problemo pri la tuteca enpenetro en la kantojn sin kaŝas antaŭ ĉio en la tekstoj kaj certgrade ankaŭ en la melodio. De tie ĉi estas ankaŭ mia decido pri la vortaj kaj ne melodiaj enskriboj des pli, ke tio koncernas konatajn makedonajn kantojn.

Ja, al ni koncernas porti nian scion en la poŝo kaj la melodion en la animo. Kiel ni de niaj prageavoj, tiel niaj geinfanoj devas esti portantoj de la komisioj, kolorigitaj de amo, ĝojo, feliĉo, ŝerco, tristo, eksterlandlaborado, kuraĝeco kaj aliaj vivospertaj veroj, kiujn ni renkontas en la popolkantoj. Tiamaniere ni eksentos la pli mallarĝan apartenecon al nia genta radiko.

La popolkanto ne havas posedanton, sed certa malgranda nombro de tiuj ĉi kantoj estas aŭtoraj. Ilin mi enkluzivis sur la paĝoj de ĉi tiu kantaro, pro ties kortuŝeco. Mi enskribis ilin tiel, kiel mi estas aŭskultinta de la pli aĝaj gemakedonoj.

La celo de la kantaro estas daŭrigi la jarcentan vivon de la nia popolkanto. Mi kredas, ke ĉi tiu malgranda

manlibro, havanta makedonaj perlojn estos vojkamara-
do viavive.

La kolekto havas malgrandan glosaron.

Por faciligo la kantoj estas aranĝitaj alfabete de la ori-
ginalaj makedontitoloj.

Ljuben Dimkaroski

Enkondukvortoj de la tradukisto

Mi plezure prenis la proponon traduki esperantlingven la 150 popolajn kantperlojn el Makedonio, kolektitaj de sinjoro Ljuben Dimkaroski. La popola kanto estas la viva ponto inter la generacioj, la luto inter la pasinteco, nuntempeco kaj futuro. Ĝi kuŝas en si mem ankaŭ la riĉeco de la popola animeco kaj komisias al ni deĉifri tiun ĉi animecon kaj eltiri el ĝi la utilon de la saĝa leciono, kiun la perloj donas al ni kiel psiĥologio, kies profundeco estas senmezura.

Mi klopodis traduki la kantojn ritme kaj laŭsence tiel, ke se, ekzemple, du japanoj tradukas ilin japanlingven, la unua — el la originalo kaj la dua — el la esperanta ekvivalento, la du tradukaĵoj estu egalvaloraj.

Kredeble la esperantista folklorŝatanto restos kontenta pro la aliro al kantperloj el Makedonio.

Nikolao Stranĝanski

Burgas, Bulgario

Mesaĝo venis, Donka, el l'kastel',
el l'kastelo, Donka, de agao:
vi kunvoku la bienservistoj,
la bienservistoj, l'junedzinoj.

Serpos ni horden etan, Donka,
etan, etan, ĝis genue, Donka.
Ili manĝos, Donka, nur bulberon
kaj vi manĝos, Donka, ŝafidaĵon.

El Mogil' mesaĝ' cirkulas

*tra la kamp' Pelagonia
kaj atingas ĝis Bitolo,
ĝis Bitolo provincestro:*

*—Provincestro, ho, Selimo,
plenas nun je ribeluloj,
ĉiuj de Dimĉo gvidataj.*

*Kaj Selimo koleriĝis,
mobilizis soldataron
kaj blokadis ribelulojn:*

*—Mi ĉi tie vin atendas
Dimĉo — hundo, ne kredanta.
Mi edzinon vian kaptos
por haremo mia, Dimĉo!*

*—Mi ĉi tie vin atendas,
ho, Selimo — hund' buĉista,
por ke vin mi senfeligu
kaj vin kroĉu je pajlejo!*

Ho, ekmuziku, muzikistoj,
unu kanton fortdezire,
por ke mi rejuniĝu,
je ĝojo dronigante l'koron.

Refreno:

*Ekmuziku, muzikistoj,
ekmuziku vi tutkore.
Festas nun animo mia,
ploras mi pro la juneco.*

*Ho, ekmuziku, muzikistoj,
unu kanton kiel la viv';
per larmegoj en okuloj
la animon mi purigu!*

Refreno:

*Ekmuziku, muzikistoj,
ekmuziku vi tutkore.
Festas nun animo mia,
ploras mi pro la juneco.*

Ni deiru, ho, kara Vasa,
ni deiru nun,
ni deiru al l'urbo Solun. /2

Tie trovos ni, kara Vasa,
tie trovos ni,
tie trovos ni junan Spasan,
junan Spasan en lazareto.

Ŝi kunvokis, ho, kara Vasa,
ŝi kunvokis,
ŝi kunvokis kuracistojn. /2

Al ŝi diras nun la unua,
al ŝi diras nun,
al ŝi diras nun: — Malkuraceblas!
L'dua diras: — Ŝi kuŝas pro am'.

Al ŝi diras nun la tria,
al ŝi diras nun,
al ŝi diras nun: — Kuracos mi vin,
mi kuracos vin, je vi edziĝos!

Nun ĉu vi scias, memoras, Milica?

*Ho, kiam estis ni malgrandaj,
ho, kiam estis malgrandaj, Milica,
tiam geamiĝis ambaŭe.*

*Tiam geamiĝis ambaŭe, Milica,
en la malgranda ĝardeneto onkla.
En la malgranda ĝardeneto onkla,
sub la folioj de la rozarbeto.*

*Surŝutis la rozujo buntajn florojn, Milica,
kaj ili falis, falis sur vin,
kaj ili falis, falis sur vin, Milica,
je mia sino dormis dolĉe vi.*

*Perpleksvizaĝe vi rigardis, Milica,
ho, tiom triste vi rigardis, Milica, /2
kaj el okuloj viaj larmoj gutis.*

Kara Milka ni forlasu

vilaĝeton Maleŝevon.

Kara Milka, fraŭlin' belega!

Vilaĝeton Maleŝevon

de tri flankoj sun' prilumas,

de tri flankoj sun' prilumas,

de la kvara flanko — luno,

kara Milka, fraŭlino belega.

En vilaĝo Maleŝevo,

ja, trifoje oni serpas,

ja trifoje oni serpas,

vinberrikoltas dufoje,

kara Milka, fraŭlino belega!

Sin pretigas, kara panjo,
sin pretigas, panjo,
l'policistoj el Koçane, panjo,
l'policistoj el Koçane, panjo.

Nun ekiras ili, panjo,
nun ekiras ili,
preter Krivan Rekan, panjo,
preter Krivan Rekan.

Ege serças ili, panjo,
ege serças ili
riberulon Iljon, panjo,
riberulon Iljon.

Kie estas tiu Iljo, panjo,
kie estas tiu Iljo?
Estas li en Solun, kara panjo,
en drinkejo malvarmeta.

*Lin priservas, kara panjo,
lin priservas, panjo,
unu makedona junulino —
bona kaj belega!*

Ĉu aŭskultas vi nun, Anĝa belega,
la liutan voĉon,
la liutan voĉon, Anĝa belega,
en haremo mia?

Vi turkino estos, Anĝa belega:
surverande sidos,
surverande sidos, Anĝa belega
kaj monerojn nombros.

Ormonerojn nombros, Anĝa belega,
perlojn fadenigos.
Ormonerojn nombros, Anĝa belega,
perlojn fadenigos, Anĝa belega,
perlojn fadenigos
por belega kolo.

Ĉu aŭskultas vi nun, turko mizera,
min harem' ne tentas,
min harem' ne tentas, turko mizera,
vi fremdulo estas!

Anica, trista animo,
senfeliĉa kial vi restis,
havante tiom da beleco,
havante tiom da fameco? /2

Refreno:

Ne tristu, Anta, ne ploru
per viaj larmoj varmegaj!
Ne tristu, Anta ne ploru,
ne malbeligu vizaĝon!
Ho, fratin' malgranda edziniĝis,
vi, fratino granda — postrestintis!

Peranton sendis vi al mi,
sed oni vin fianĉigis.
El koro mia eltiris
vin viaj paĉjo kaj panjo.

Refreno:

Al svatanto mia diris ili:
—Estas fianĉino jam Anta,

*estas fianĉino Anta jam,
fianĉino de Dimitro.
Proponas ni la malgrandan
fraŭlinon Vasilkan!*

Refreno:

Belulinon amas mi,
belulinon amas mi.

Refreno:

Kaj rigardas kaj mi amas,
sed ne estas je utilo.
Dolĉega, dolĉega,
bela kaj malfidela

Kurbajn brovojn amas mi.

Refreno:

Okuletojn amas mi.

Refreno:

Medan buŝon amas mi.

Refreno:

Biljana tolon blankigis

ĉe la fontegoj de Oĥrid.

Trapasis vinproduktistoj

kaj ĉiuj blankaj urbanoj:

—Karavananoj urbanoj,

trapasu vi tre atente,

ke tolon mian ne vadu,

ĉar l'tolo estas donaco —

ceremonia donaco

por bogepatroj dum nupto!

—Se ni l'tolon difektos,

per vino ni ĝin kompensos,

per vino ni kompensos,

per vino kaj forta brando!

—Karavananoj urbanoj,

mi vinon ne deziras,

deziras mi la junulon,

gvidanta la karavanon!

Bitola,
naskiĝa lok'
por ĉiam vi restas,
eden' mia land'!

Refreno:

Bitola — naskiĝa land'
ŝatas mi vin, pri vi mi kantas.
Bitola — naskiĝa land',
ŝatas mi vin, edena land'!

Mi vizitis vilaĝojn, urbojn,
sed similan je vi, Bitola,
mi ne trovis!

Refreno:

Naskiĝa lok',
kiu povus
adiaŭi vin
sen plorolarmoj?

Refreno:

Bitola, nur en Bitola

*oni povas vivi bone,
oni povas vivi bone
kaj bone manĝi kaj drinki.*

*Printempe Bitola estas
ĝardeno verda kaj ora
kaj ties belaj fraŭlinoj
vizaĝe estas ĉarmegaj.*

*Bitola, nur en Bitola
naskiĝas belaj frŭlinoj
kaj ili estas malbeno
por ĉiuj fraŭloj amemaj!*

Dio punu tiun, kiu

*iris eksterlanden sian panon gajni,
eksterlanden, kara mia, Amerikon.*

*Jam tri jarojn sen laboro,
sen laboro, kara mia, sen mono.*

*Jam alvenis tien ĉi la ŝip':
mi ne havas monon por bileto, kara.*

*Se dezirus vi l'alvenon,
vendu vi kolĉenon vian, kara mia.*

*Se ĝi ne sufiĉos, vendu,
kara mia, la avaran veston:
sendu monojn, kara, por ke mi alvenu!*

Dio murdu, panjo, dio murdu
mian najbareton, mian tajloreton,
mian najbareton, mian tajloreton.

Ve, al mi: mallargê tajlis
mian veston, panjo, mian jakon, patrino;
mian jakon, panjo, mian veston, patrino!

Refreno:

Ho, amo, turmenta,
duonon' svelta por najbareto! /2

Li al mi mallargê tajlis,
sed konvenas bone mian veston, panjo,
mian jakon, patrino!

Refreno:

Donu min al li, patrino!
Donu min, patrino,
al la najbareto, al la tajloreto!

Refreno:

Gjorgji la rabist' malsanas

en la malliberejo Solun.

*Tutan tagon kuŝas Gjorgji,
nokte oni lin enketas:*

*—Diru vi, rabisto Gjorgji,
kie estas ja fusilo,
kie estas la pafilo?*

*—Kapon donos malamiko,
vorton pri fusil' ne diros,
pri fusilo, malamiko,
pri fusilo, pri pafilo!*

*—Kiel gajnis vi, ho, Gjorgji,
la havaĵon grandan?*

*—Riĉularon mi perfortis
ties monojn mi forprenis!*

Nun malsanas juna Stojan,

kuŝas li kaj mortos eble.

Ĉe li estas la edzino,

la edzino kun l'infano.

Ŝiaj larmoj gutas pace

sur la vizaĝon de Stojan.

Vekiĝante pro la larmoj

Stojan diras al l'edzino:

—Junedzino mia, ho, Nevena,

kio gutas survizaĝen?

Ĉu ne gutas rosrosero, kara,

ĉu ne falas pluvaj gutoj?

Kaj Nevena diras:

—Ho, dommastro, ho, Stojan,

rosrosero nun ne gutas,

pluvgutetoj nun ne falas!

Falas, kara, miaj larmoj

pro malrajtoj vilaĝanaj:

Ĉi vespere ĉe la fonto

l'vilaĝanoj grupiĝis,

priparolis mian sorton:

*kiam mortos vi, l'infanon
deprenante de mi
min forportos malproksime
kaj forvendos min pro mono!*

Mile Pop-Ordanov malsana kuŝas;

super ties kapo staras ties panjo.

Triste kompatas, triste ŝi ploras:

*—Levu kaj leviĝu, kara mia filo,
viaj kamaradoj sur la strato kantas
tristajn kantojn. En la kantojn — via nomo:*

*Mile Pop-Ordanov, dio lin absolvu,
Mile Pop-Ordanov por popolo falis,
por popolo falis, por Makedonio!*

*Ties fratinoj portas funebrajn vestojn,
ke edzinigos ili la fraton,
lin edzinigos je Makedonio.*

*Ties patrino portas funebran veston,
ke edzinigos filon karegan,
lin edzinigos je Makedonio.*

Plantis pinon juna Evgenija,
plantis pinon, preĝis al dio.
Plantis pinon juna Evgenija,
plantis pinon, preĝis al dio:
—Donu dio, pino elkresku, /2
por ke mi grimpu sur la branĉon.
Donu dio, pino elkresku,
por ke mi grimpu sur la branĉon.
Por ke mi vidu mare ŝipon, /2
en la ŝip' bravulon katenitan.
Por ke ekvidu mare ŝipon,
en la ŝip' bravulon katenitan.
Ties manoj estas en ĉeneroj, /2
ties kruroj estas en katenoj.
Ties manoj estas en ĉeneroj,
ties kruroj estas en katenoj.
Sur la ŝultroj — du falketoj grizaj. /2
Kaj demandas juna Evgenija,
kaj demandas juna Evgenija:
—Kiel nutras vi du grizaj falkojn?
—Mia karno estas ties nutro, /2

*miaj larmoj estas ties akvo.
Mia karno estas ties nutro,
miaj larmoj estas ties akvo!*

Ŝiris frambojn fraŭlino

en la pastraj ĝardenoj.

Ŝiris frambojn fraŭlino

en la pastraj ĝardenoj.

Ho, aman, aman, aman, aman! /2

Jen kaj kampogardisto,

kiu al ŝi parolas:

—Nun atentu, fraŭlino,

nun mi diros du vortojn!

Ho, aman, aman, aman, aman! /2

Li ne diris, du vortojn,

kaptis li ŝin je mano.

Li ne diris, du vortojn,

kaptis li ŝin je mano!

Ho, aman, aman, aman, aman! /2

—Onklo kampogardisto,

estas pastra nepin' mi.

Se vi estas nepino,

kial ŝiras vi frambojn?!

Ho, aman, aman, aman, aman! /2

Vinon drinkas mi kaj brandon.

*Sur ĉevalo mia juna
mi travagas la kamparon.*

*Travagante ĝin ĉevale
mi atingas ĝis drinkejo.
En l'drinkejo tri knabinoj.*

*La unua verŝas. L'dua
portas. L'tria min rigardas.*

*Kaj mi ŝin surĉevaligis
kaj forportis ŝin en l'domon.*

Nun ĉevalon rajdas mi

*voje al la junedzin',
voje al la junedzin',
Ĉu estiĝus mia ŝi?*

*En l'vilaĝ' tamburo frapas:
oni dancas ronde,
oni dancas ronde.
Dancas kaj fraŭlino.*

*Donas ŝin la patro,
la vilaĝ' kontraŭas.
La vilaĝ' kontraŭas,
ĉar belega estas.*

*Mi mortos, panjo, pereas:
sen ŝi ne povas reveni.
Vilaĝpedel' mi estus
nur ŝin mi povu rigardi!*

Forkaptis fiaj turkoj

*fraŭlinon tre belegan.
Forkaptis fiaj turkoj, fiaj turkoj
l'plej belan en la vilaĝo.*

*Kaj ligis ambaŭajn manojn,
ambaŭajn manojn returnen.
Kaj ligis ambaŭajn manojn fiaj turkoj,
ambaŭajn manojn returnen.*

*—Diru, diru vi, fraŭlino,
la rifuĝejon de Goce?
Diru, diru vi, fraŭlino, vi fraŭlino,
la rifuĝejon de Goce?*

*—Mi mortintus, fiaj turkoj,
l'rifuĝejon mi ne diros!
Mi mortintus, fiaj turkoj, fiaj turkoj,
l'rifuĝejon mi ne diros!*

Masonis klostron Ilija.

*Masonis klostron Ilija, ho, aman, aman.
sur Pirinmontara pinto.*

Al klostro venas Ilina.

*Al klostro venas Ilina, ho, aman, aman.
kaj al Ilija parolas:*

*—Akceptu min, Ilija
akceptu min, Ilija, ho, aman, aman.
en via ĉelo klostreja!*

*—Ne povas mi, ho, Ilina:
vi estas blondharulino, ho, aman, aman.
provokas viaj okuloj!*

*—Nigrigos mi la blondharojn,
l'okulojn mi kvietigos.
Nigrigos mi la blondharojn, ho, aman, aman.
l'okulojn nigrigos!*

Ĉiam estu vi, patrino, malbenita,
ke vi donis min, patrino en Varoŝ,
en ĉi tiu malbenita Varoŝ, panjo,
ho, en malbenita Varoŝ!

Ĉe Mitrikevci en Varoŝ, patrino mia.
Multnombraj estas Mitrikevci, kara panjo,
multnombraj ege estas ili,
multnombraj ege estas ili!

Mi knedis dek legompastaĵojn, kara panjo,
miavice ne sukcesis mi gustumi.
Tiel ilin ne sukcesis mi gustumi,
Tiel ilin ne sukcesis mi gustumi.

Ili diras, ke manĝinta estas mi,
ili diras, ke manĝinta estas mi,
ke manĝinta estas mi ĉe vi, patrino,
ke manĝinta estas mi ĉe vi, patrino!

Da fina vino ruĝkolora

*ekdormis via amanto
en la montar Kara-Kamen
sur senakva monteto.*

*Preterpasis senhejmuloj
kaj ŝtelis ties kapoton,
ho, ŝtelis ties kapoton,
en drinkejo ĝin forvendis.*

*En drinkejo ĝin forvendis
por forta blanka brandeto,
ho, por forta blanka brandeto
kaj por vino ruĝkolora.*

*Se l'kapoto estas ŝtelita,
ke estu viva l'amanto.
Se l'kapoto estas ŝtelita,
ke estu viva l'amanto!*

Vi parolis, kara:

*—ĉu vi ne memoras,
kiam ni estis, kara,
ambaŭ promenade.*

*Tiam vi diradis,
tiam vi ĵuradis,
ke alian vi ne amas,
ja, alian, kroman.*

*Per tranĉilo, kara,
vi disekcu koron:
ene trovos, kara, vi
du amantajn korojn.*

*Kiom trista estas, kara,
kiom trista estas,
mi vin amu, kara,
vin alia prenu.*

Donu min, patrino kara, donu min

*al ĉi tiu ciganeto, kara,
ho, al ĉi tiu ciganeto,
ho, aman, aman!*

*Estas ties buŝ' skatolet', kara, panjo,
estas ties dentoj perloj, panjo,
ho, aman, aman,
ho, estas ties dentoj perloj.*

*Ties dom' kabano estas, kara, panjo,
sed por mi palaco estas, panjo,
ho, aman, patrino mia,
por mi palaco.*

*Tage vidas mi lin kiel ciganeto,
nokte estas li por mi kolombo,
ho, aman, ho, aman, kara, panjo,
nokte kolombo!*

Vi, senprudentaj jaroj junulaj,
forflugis kiel grizaj kolomboj.

Enfalis vi en kortojn fraŭlinaj,
ensaltis vi en sinojn fraŭlinaj.

Almenaŭ estis liberecon
en tiu riĉa land' Valaĥio.

Mi trosatiĝis je valaĥinoj,
fraŭlinoj belaj kaj junedzinoj!

Fraŭlineto, fraŭlineto,

min ĉu vi amegas?

Fraŭlineto, min ĉu vi amegas?

—*Amas mi vin, amas mi vin,
vidas vin je songo,
amas mi vin, vidas vin je songo.*

—*Se vi songas, se vi songas,
al kiu diras vi?
Se vi songas al kiu diras vi?*

—*Mi rakontas, mi rakontas,
al patrino mia,
mi rakontas al patrino mia!*

—*Se vi diras, se vi diras,
kion diras panjo?
Se vi diras kion diras panjo?*

—*Panjo diras, panjo diras:*
Amu lin, filino!
Panjo diras: amu lin, filino!

Ĝis kiam, fratoj, karaj makedonoj:

*ĝis kiam grekoj subpremos
per sia aroganta helenismo
naskiĝan nian landon?*

*Tiele antaŭ du cent jaroj
la helenismo per mensogoj
konkeris nian eklezion,
altrudis sian patriarkon.*

*Verkistoj niaj kie estas,
gazetoj niaj kie estas?
Fanariotoj grekaj ĉion nian
cindrigis kaj polvigis tre malice.*

*Rezisti devas, ho, makedonoj
el ĉiuj niaj randoj,
kaj nia granda voĉo devas eĥi:
—De tie ĉi — eksteren, grekoj fiaj!*

Endormiĝas mi, patrino kara,
mi okulfermetas,
ho, okulfermetas mi, patrino kara,
ho, okulfermetas.

—Se vi ekdormiĝas, kara filo,
manĝu kaj kuŝiĝu,
ho, manĝu kaj kuŝiĝu, kara filo,
manĝu kaj kuŝiĝu!

Kaj se mi kuŝiĝus, kara panjo,
mi ne ekdormas, ho.
Ho, mi ne ekdormas, kara panjo,
pro la najbarino.

Iru kaj demandu, kara panjo,
ĉu ŝin oni donos.
Ĉu ŝin oni donos, kara panjo,
ĉu ŝin oni donos?

*Kaj se oni donos ŝin, patrino,
vi fiakre venu,
kaj se oni ŝin ne donos, panjo,
restu, kaj rigardu ŝin!*

Unu etfraŭlino
restis sen patrino.

*Ŝi elkreskis kaj pri
la patrin' demandas:*

*—Diru al mi, paĉjo,
kie estas mia panjo?*

*—Via panjo kuŝas
en la nigra tero!*

Ho, fraŭlino, etfraŭlino,
mi envias la trankvilon,
mi envias la trankvilon,
ĉar per ĝi vi ĉe gepatroj
tutan nokton vi dormadas.

Mi kompatidulo, ĉiam
enlitiĝas sola nokte,
ellitiĝas sola frue.

Mezonokte mi vekigis,
etfraŭlino, kaj mi palpas,
etfraŭlino, kaj mi palpas,
kaj mi palpas, etfraŭlino,
palpas kaj nenion trovas.

La kusenon mi brakumas,
la kusenon mi brakumas,
larme mi ĝin superverŝigis.

*Larme mi ĝin superverŝiĝas,
per naztuk' mi elviŝiĝas,
per naztuk' mi elviŝiĝas,
miabruste ĝin sekigas!*

Elena, ido, Elena,
vi nura filino,
sur kio vi enpensigas
kaj skribas leteron:

—Mi skribas, panjo, mi skribas
al urbo Edrine,
al tiu urbo Edrine,
al tiu urbo Edrine,
al mia amato:

Li, panjo, al mi acetu
ĉapelon belegan,
belegan, panjo altprezan!

Kiam mi fraŭlo estis, panjo,
tiam sentis mi pli bone, panjo.

Mi edziĝis, panjo, mi edziĝis,
malboneco, panjo, min atakis.

Ĉar mi havas, panjo, ĉar mi havas
ege malsanema junedzino, panjo.

Tutan nokton, panjo, tutan nokton
miamane estis ŝi kuŝinta, panjo.

Eĉ la mano perdis sensitivecon, panjo,
eĉ la mano perdis sensitivecon, panjo,

Ke ne povas mi surĉevaliĝi, panjo,
ke ne povas mi surĉevaliĝi.

Min surĉevaligas kamaradoj, panjo,
min surĉevaligas kamaradoj.

Edzigu min, kara panjo,
edzigu min, dolĉa panjo,
dum junuleco!

Ĝis kiam, kara patrino,
ĝis kiam ĉiuj fraŭlinoj
min ege ŝatas.

Ĝis kiam, kara patrino,
ĝis kiam, panjo, floro
konvenas al mi.

Kaj prenu al mi, kara panjo,
kaj prenu al mi, dolĉa panjo,
fraŭlinon belan!

Por paĉjo kaj vi, patrino,
por paĉjo kaj vi, patrino,
grandega ĝojo!

Kial lumradias, Dana, vizaĝe,
kaj por kiu fulmas, Dana, okule,
kaj por kiu gardas, Dana, staturon,
tiu ĉi staturon, Dana, marmoran?

Al mi diru, dorlotata vi, Dana,
vian blondharojn kiu karesos,
vian veŝton kiu malbutonumos,
kiu, kara Dana, vin kiskaresos.

—Vi pri mi, junulo, nun ne sopiru,
kaj ne perdu vian tempon, junulo!
Hieraŭ vespere mia patrino
al maljunulaĉo min jam promesis!

Jam subiras suno klara

*kaj jam malluliĝas,
kaj la luno jam malaperas
ie dronigita!*

*Vi kaj mi, arbaro mia,
ni nigriĝu ambaŭ:
vi pri la folioj verdaj,
mi pri la juneco.*

*La folioj denove kreskos,
ho, arbar'— fratino,
sed juneco, fratino mia
ĉu revenos iam!?*

Adiaŭ, patrino kara,
*venis tag' por forveturo.
Pro disiĝo koro tristas
kaj mi, panjo, ekkantetas.*

*Adiaŭ, ho, domo patra,
adiaŭ, gefratoj miaj,
adiaŭ vi, gekamaradoj,
adiaŭ, geinfanoj!*

*Mi kun ĉiuj nun adiaŭas
per ĉi tiu lasta kanto.
Kie ajn mi estus, ĉiuj
en memoro mia restos.*

*Kaj pri vi, patrino kara,
kaj pri vi mi ofte ploros
en la nekonata lando,
kie mia vivo pasos!*

Kial vi, patrino, kial vi min naskis?

Vi tutan vivon min ne vidis.

Estas vi naskinta, panjo, viran idon,

estas donacinta al alia ĝojon vi,

ho, aman, aman, aman...

estas donacinta al alia ĝojon vi.

Oni recitas:

mi diurnen iras, vagas mi diurnen

kantas, ludas, dancas kaj mi ploras.

Antaŭ mi vizaĝo via estas ĉiam

ho, aman, aman, aman!

Ŝuldigita estas mi al vi

ho, aman, aman, aman!

Ŝuldigita, ŝuldigita estas mi al vi.

Vi virino tre heroa estas, panjo,

ke naskinta estas vi feliĉan stelon.

Disradias mi, patrino kara, ho, aman, aman,

prilumas mi l'naskiĝan lokon, kara panjo,

ho, aman, aman, aman...

prilumas mi l'naskiĝan lokon, kara panjo!

Mezvilaĝe – tamburfrapoj

*kaj klarnetoj eĥas forte,
gejunuloj rum-dum-dum
rondodancas gaje.*

*Venas maljunulo blanka,
havanta lipharojn,
volas je la dancorondo
ankaŭ algluiĝi.*

*Lin avino Neda vidis,
lin je mano kaptis:
—Kien iras, maljunulo
streĉi oldan bruston?!*

Vi eliru, olda panjo,

ĉe fenestreto

kaj vi vidos, kiu pasas

pro li mi mortas.

Preterpasis, kara panjo,

amanto mia,

preterpasis la amanto

pro li mi mortas.

Kiam iras — vento ventas,

patrino mia;

kiam sidas suno brilas

pro li mi mortas!

Mi pendumos, mi min dronos,

patrino mia!

Mi pendumos, mi min dronos,

pro li mi mortas.

Mi edziniĝos je Gjorgji

pro li mi mortas.

Li kondukos min en Oĥrid,

patrino mia.

Li kondukos min en Oĥrid,

*pro li mi mortos.
En la lago perboate
ni promenados!*

Jana, vi amata, Jana, vi amata,
Jana mia, roskovrita trifolio,
ho, Jana mia, roskovrita trifolio.

Preteriras, Jana vi kaj preterpasas,
lignon kaj ŝtonegon, Jana, vi forbrulas,
ho, lignon kaj ŝtonegon, Jana, vi forbrulas.

Kaj demandis, kara Jana, vin la mastroj:
—Kion vi preparas por vespermanĝaĵo,
ho, kion vi preparas por vespermanĝaĵo?

Ĉu preparas kokinaĵon aŭ pasteĉon,
aŭ preparas, kara Jana, ŝafidaĵon?
Ho, ŝafidaĵo, Jana, el ŝafido juna?

Sendis mi por klara akvo vin, Kalina.

*Vi por akvo iras
kaj vizaĝon lavas,
ĉiam al junuloj rigardante vi.
Ne bezonas mi vizaĝon, patrino,
kiam ne ekzistas
kiu ĝin karesu,
viaj vortoj vanaj estas, patrino!
Sendis mi vin je kampo, Kalina,
vi al kampo iras,
vi la harojn kombas,
ĉiam al junuloj rigardante vi!
Ne bezonas mi hararon, patrino,
kiam ne estas,
kiu ĝin karesu.
Viaj vortoj vanaj estas, patrino!
Al vitkampo vin sendis mi, kara,
en vitkampon iras,
traŭbon vi rikoltas
al junuloj donas ĝin vi Kalina.
Ne bezonas mi vinberojn, patrino,*

*se ne estas iu kun
mi rikoltadu,
vin ne aŭskultas mi, ho, vi patrino.*

Jovana, Jovanka,
vi ĉe Vardar estas, kara,
kaj blankigas tolon,
vi blankigas tolon, kara,
rigardante supren!

Jovana, Jovanka,
atendas mi vin, Jovana,
mia hejmen venu,
sed vi ne alvenas, kara,
koro mia Jovanka!

Jovana, Jovanka,
via panjo, kara,
malpermesas ĉiam
vi ĉe min alvenu, kara,
koro mia Jovana!

Diru, Jana, diru, koro,
kiun nokton mi alvenu.
Diru, Jana, diru, koro,
kiun nokton mi alvenu, kara?

Kiam volas, tiam venu,
kun aliaj ne alvenu.
Kiam volas, tiam venu,
kun aliaj ne alvenu, kara!

Povas preni vi, Georgon —
la bonulon, bonvivantan.
Povas preni vi, Georgon —
la bonulon, bonvivantan, kara!

Li câmbreton mian scias,
la câmbreton, kalkșmiritan.
Li câmbreton mian scias,
la câmbreton, kalkșmiritan, kara!

*Malgrandeta estas l'cambro,
por duopo estas l'cambro.
Malgrandeta estas l'cambro,
por duopo estas l'cambro, kara!*

***Al mi, Katinka, vi diru**
kiun vesperon mi venu?!*

Refreno:

*Estas mi malsanul'
malsana sen malsaneco.*

*Kiun vesperon mi venu
ĉe via sojlo ekstari?*

Refreno:

*Antaŭ pordo mi ekstaru,
kaj vortojn tri mi eldiru
kaj vortojn tri mi eldiru,
vizaĝon vian rigardu.*

Refreno:

Diru, Rajna, diru, koro,
*kiu lasis al vi signon
sur l'vizaĝo blanka!?*

*—Se demandas vi, patrino,
mi la veron diras al vi,
mi la veron diras,
mi la veron diras.*

*Hieraŭvespere, panjo,
estis makedonoj,
ĉiuj sur ĉevaloj blankaj
kaj sur seloj oraj.*

*Ties estro estis, panjo,
mia amoristo.
Tiu lasis al mi signon
sur l'vizaĝo blanka!*

Diru, diru, Stana, kial

enpensigis, kara?

Ĉu ne havas veston vi aŭ

al vi mono mankas?

Ho, al mi mankas nenio,

escepte unu.

Ne navas mi, kara Dimĉo,

ideton propran.

Ho, karega Stana, iros

mi al urbo Solun

kaj aĉetos, kara Stana

al vi idon oran.

Ne bezonas mi, karega

Dimĉo, idon oran,

ĉar ne diros tiu ido

kore al mi: — Panjo!

Vi nudpiede rikolti

iras, ho, Kita!

Refreno:

*Kita, sopiro grandega,
Kita, vi, koramatino,
forta sopiro grandega,
mia vi, koramatino!*

*Vi nudpiede rikolti
iras per serpo.*

Refreno:

*Serpon vi portas surŝultre,
idon — en mane!*

Refreno:

*Lasu la serpon vi, Kita,
venu ĉi tien!*

Refreno:

*Kiel tiu glaso estas plena je vino,
tiel estas mia koro plena je zorgo.*

*Ĉu mi drinku, por drinkigi min, ho, patrino,
por ke mi, patrino, miajn zorgojn forgesu?*

*—Vi aŭskultu, filo mia, via patrin',
vi aŭskultu: ne utilas vi la drinkaĵo.*

*Trovu por vi, kara filo, trovu fusilon,
en arbaron verdan, kara filo, vi fuĝu.
Tie, filo, trovos vi fidelan taĉmenton.
Tie, filo mia, viajn zorgojn forgesos!*

Diantino, fraŭlino kara,

Diantino, fraŭlino.

*Vi ne ornamas vin diante,
je diant' vi odoras!*

*Sin ornamas la amikinoj,
sin ornamas diante ili,
sin ornamas la amikinoj,
sed ne odoras, kara.*

*Tutan tagon mi staras, kara,
antaŭ viaj pordegoj.
Tutan tagon mi staras, kara,
kun pafilo en mane.*

*Mi intencas mortigi, kara,
mi intencas mortigi.
Mi intencas mortigi, kara,
kugle viajn gepatrojn.*

*Tre bedaŭras mi, kara, mia,
tre bedaŭras mi, kara,
ke vi restos orfeto, kara,
orfeto sen gepatroj!*

Kata, belstatura, Kata,
je birdeto vi ŝanĝiĝu.

Kaj transflugu la doloron
kaj komprenu vi la tempon.

Kaj komprenu vi la tempon
kaj reciprokan amon!

Amis ni nin reciproke,
sed ne geedziĝis, kara!

Vi, alilandano, kara,
kiam iras tra la vojojn longajn,
ĉu ne vidis mian Gjorgjon,
tiun Gjorgjon, kiun mi amegas?

—Ja, mi vidis lin drinkeje,
kie dolĉe li manĝetis,
kie dolĉe li manĝetis,
ankaŭ ŝaŭman vinon drinkis!

Kiam falis pezvundita

*Jane sur Pirino,
falkoj tri alflugis ĉe lin
kaj al Jane parolis:
—Iru kun ni Sandanski,
kuracilon ni trovos.
Panjo Makedonio
kuracilon por vi trovos.
La unua vin kunportas
preter nia Vardar.
Kaj la dua vin kunportas
ĉe pelaga Egeo,
kaj la tria vin kunportas
sur Pirina montaro.
Resaniĝos vi, Sandanski,
por liberigu Makedonion!
—Sciu, sciu vi, tri falkoj,
estas mi vundita kore.
Lasu min ĉi tie morti
kuracil' ne estas.
Makedonio aliajn naskas*

*ili ĝin liberigos.
Panjo Makedonio
naskos aliajn,
por ties liberec'.*

Kiam beliĝis vi, junedzino,

pro kio pensis vi, karega,

vi, edzino nigrahara,

nigrahara, nigraokula!

Eble pri knabo dolĉa vi pensis,

pri tiu pensis vi, karega,

vi, edzino nigrahara,

nigrahara, nigraokula.

L'knabo ne estas knabo dolĉulo,

pri tiu mi ne pensis, kara,

ĉar mi estas nigrahara,

nigrahara, nigraokula.

L'piro ne estas piro dolĉega,

pri tio mi ne pensis, kara,

ĉar mi estas nigrahara,

nigrahara, nigraokula.

Tiam ĉu vi havas ĉemizon por bopatro,

pri tio mi ne pensis, kara,

junedzino, nigrahara,

nigrahara, nigraokula?

Ĉu vi havas kaptukon por via bopanj

*kaj ŝtrumpojn por bofrato via,
junedzino, nigrahara,
nigrahara, nigraokula!?*

Ironte mi al fremdlando,

*Dafina, kara Dafina,
ĉe viaj pordoj vi pasis,
okuloj estis plenaj je larmoj.*

*Rezignas vi, kara, rezignas
unua vian amegon.*

*Rememoru niajn vortetojn,
kolombo mia, neforgesebla.*

*Via fojnejo ekflamu,
vian domon forbruligu.*

*Vizaĝo via anĝela
miamanen enfalu, kolombo!*

Kantas mi, pensas aliaj,
ke estas mi senzorgulo,
sed mi per kantoj deziras
malĝojajn miajn forgesi!

Preterpasas la amato
kun du fidelaj amikoj.
La amato estis rozo,
amikoj estis branĉetoj.

L'amarin' al mi parolas:
vespere venu, karega,
vespere venu, karega,
sub la fenestro atendos.

Vespere venu, karega,
sub la fenestro atendos.
Ne povas alveni mi, kara,
ĉar mi pliamas alian!

Ĉe Vardaro ŝi sidis

Orĉapeton ŝi brodis.

Refreno:

*Vin fremdulo, dolĉemulo
prenos mi — al ĉiuj spite!*

*Orĉapeton ŝi brodis
tra larmetoj varmegaj.*

Refreno:

*Tra larmetoj varmegaj.
Aj, ŝi tordis la manojn.*

Refreno:

*Aj, ŝi tordis la manojn.
sian patrinon malbenis.*

Refreno:

El Kruŝejo alvenis

*grava mesaĝ' ribelula
al ĉiuj, havantaj filojn.
ke ili ilin forsendu
al tiu glora Smilevo.*

*Stojan ne havas filojn,
li havas nur filinon —
Todorka unu je panjo.*

*Todorka al patro parolas:
—Aĉetu al mi fusilon
kaj unu sabron akregan,
por ribelulino mi iros
en tiun gloran Smilevon.*

*Kaj tutajn tri jarojn neniu
homo Todorkan suspektis,
ke Todorka estas knabino!*

Vi mensogu, Vera,
vi mensogu ĉiujn,
nur vi min ne povas
nun mensogi, Vera.

Ĉar mi havas, Vera,
ĉar mi havas, kara,
ĉar mi havas, kara,
tri malsanojn, kara!

La malsan' unua
estas, kara Vera,
la drinkejoj urbaj,
la drinkejoj urbaj!

La malsano dua
estas, kara Vera,
la irado ofta
al fremdlando, kara.

*La malsano tria
estas, kara Vera,
ke pro amo brulas,
brulas pro vi, kara!*

Malsanas Elena

*tri jarojn, tri jarojn
kaj tridek monatojn.*

*Ĉe ŝi estas staranta
ties olda panjo
al ŝi parolante:*

*—Stariĝu, filino,
ĉar svatantoj venis,
svatantoj el Skopje.*

*—Kiel ili venis,
tiel ili foriros,
ĉar mi havas, panjo,
knabon en Strumica.*

Lena skribas, Lena skribas

sur leterpapero blanka nigrajn vortojn.

La leteron ŝi elsendos

al Stambulo, al Stambulo, al la frato.

Kara Spiro, kara frato,

jam vi scias, jam vi scias, venu hejmen,

ĉar malsanas Angelina,

via Angelina, via junedzino.

Spiro venas, Spiro venas

sur ĉevalo, sur ĉevalo rapidira,

por ke vidu, por ke vidu

Angelinan sian, Angelinan sian!

Liljana, kara Liljana,
aŭskultu kion mi diros,
knabino bela,
aŭskultu kion mi diros:
Mi la bienon disvendos
kaj vin, Liljana mi prenos,
knabineto bela,
knabineto, bela Liljana.
Mi kolieron forvendos
kaj vin, Liljana mi prenos,
knabineto bela,
knabineto, bela Liljana.
La koliera kostprezo
egalas je mia gorĝo,
karega Gjorgji,
egalas je mia gorĝo.
Ŝafaron mian forvendos
kaj vin, Liljana mi prenos,
knabino bela,
knabino, bela Liljana!
L'okuloj miaj prezindas

*je tuta via ŝafaro.
Gjorgji tiom
l'okuloj miaj prezindas!*

Knabino bela Liljana,
filino nura je panjo,
ĉu vi ankoraŭ senedza
l'korojn junulajn bruligas?

Knabino bela Liljana,
Liljana birdo bunteca,
virinon kaj geinfanojn
mi lasos pro vi, Liljana.

Ne havu Liljana, ne faru
profundan vundon en koro.
Mi pretas tutan jarcenton
al vi sklaviĝi, Liljana!

***Ho, Lina, belega karulino,**
kiun nokton mi ĉe vin alvenu.*

*Ĉiun nokton venu vi, Georgi
nur ĉi tiun nokton ne alvenu,
ĉar, Georgi, paĉjo malĉeestas
iris li en Solun je marĉando.*

*Iris, panjo, mi kaj vidis Linan,
kiel ŝi priservas bopatrinon!*

Vartis Jana infanon

de la fratedzino.

Al ĝi ŝi belkantis

kaj ĝin ŝi malbenis:

—Dio donu, infanon

kaj mian neveton,

hodiaŭ mi lulu

kaj morgaŭ — funebru.

Ĉar obstaklo ci estas

foirejon viziti,

foirejon viziti

kun amato vidiĝi!

Gejunuloj amis sin longe,

*tre longe amis sin ili,
ekde infaneco ties,
karega mia!*

*Venis geedziĝa tempo, ho,
venis geedziĝa tempo
la filinon panj' ne donas,
karega mia!*

*Kaj decidis gejunuloj, ho,
kaj decidis gejunuloj
en arbaron ambaŭ iri,
karega mia!*

*Ŝi estiĝis arb' acera, ho,
ŝi estiĝis arb' acera,
li estiĝis najtingalo,
karega mia!*

Makedona knabino – makedonino,
vi bukedo tre bunta kaj donacita!

Refreno:

*Ĉu ekzistas en tiu blanka mond’
pli belega ol tiu makedonino?
Ne ekzistas, ne naskiĝos
pli belega ol tiu makedonino!*

*Se ŝi kanton ekkantas, najtingalon superas,
se ŝi dancon ekdancas, gajnas animon!*

Refreno:

*Kiel silkon malplektas sian hararon
pli belega ol feino ŝi!*

Refreno:

Kiu je pordo frapfrapas?

—Via fidela amato
frapfrapas, filino!

Ĉu mi malfermu la pordon?

—Vi ne malfermu, filino,
mankas vespermanĝo!

Vespermanĝo estos, panjo,
vespermanĝo estos
miaj dolĉaj vortoj!

Ĉu mi malfermu la pordon?

—Vi ne malfermu, filino,
ne estas sternaĵo!

La sternaĵo estos, panjo,
la sternaĵo estas
mia korpo bela!

Mariça, belega knabino,

*pro vi mi pereos kaj mortos,
ho, aman, ho, aman!*

*La vivon pro vi mi fordonos,
ho, aman, ho, aman!*

*Demandu vi vian patrinon,
ĉu ŝi geedziĝon permesas,
ho, aman, ho, aman,
ĉar orfo, Mariça mi estas,
ho, aman, ho, aman!*

*Ho, junulo kaj petolulo,
havas mi neniojn parencojn, ho,
ho, aman, ho, aman,
estas orfo sen panjo kaj patro mi,
ho, aman, ho, aman.*

*Se intencojn tiajn vi havas
sola vian domon mi venos, ho,*

*ho, aman, ho, aman,
por restadi tutan jarcenton, ho,
ho, aman, ho, aman.*

Ho vi Marija, bela Marija,
kial vi teksas, teksas kaj ploras;
ĉu la teksilo havas defekton
aŭ la tekstrabo jam frakasitis?

Nek la teksilo havas defekton
nek la tekstrabo jam frakasiĝis,
sed mi priploras mian amaton,
ĉar estas tre malproksime!

Marika bela knabino,
Marika hinda tageto,
multe da jaroj portata
sur fraŭlaj vestaj refaldoj.

Unuan jaron mi iris
svatiĝi mi je Marika.
Patrino ties respondas:
—Malgranda estas Marika!

Sekvantjare mi iris
svatiĝi mi je Marika.
Patrino ties respondas:
—Malsana estas Marika!

La trian jaron mi iris
svatiĝi mi je Marika.
Patrino ties respondas:
—Forpasis nia Marika!

Kun tri ŝarĝoveturiloj

*kanabsakoj da rizgrajno
ekiris brunhaŭta Donĉo
al urbo Bitola.*

Refreno:

*Kompatind', kompatinda,
kompatinda nia Donĉo,
kompatinda nia Donĉo,
Donĉo nia el Ŝtip.*

*Dumvoje Donĉo renkontis
turkojn patrolistojn.
En la rizo trovis ili
bombojn kaj patronojn.*

Refreno:

*Tuj enigis ili Donĉon
en mallibereja ĉelo
kaj komencis lin torturi.*

Refreno:

*Brave, brave, ke denunciis
neniun Donço!*

Refreno:

Kial naskis vi min, panjo,

malriĉulon vi?

Malriĉulo restis mi:

Mi monujon havas, sed ne havas monon,

malriĉulo restis mi.

En loĝejo havas mi nek katon, nek edzin'

malriĉulo restis mi.

Mia lito estas sen matracoŝtofo nun,

malriĉulo restis mi!

Dronigita estas nia
land' en sang' kaj larmoj.
La arbar' senfoliiĝis,
restis sen junuloj.
Kaj post tiu ĉi batal'
brilis l'libereco.
En mil naŭ cent tria jaro
Respublik' aperis
Respubliko en Kruŝevo
en glora Kruŝevo
makedona Respubliko,
sur l'Balkan — l'unua.
Kaj Nikola Karev estis
l'prezidant'unua.
Dame Gruev, Pitu Guli
kaj Jane Sandanski —
ĉiuj estroj makedonaj,
ĉiuj ribelestroj.
Por liber' pereis tiuj
gloraj batalantoj
kaj al makedonoj ili

*faris testamenton:
luktu ili por libero,
por Makedonio!*

Laca falko trinkas

akveton el Vardar.

Refreno:

Jane, Jane, blanka gorgô.

Jane vi, oferŝafido.

Falko laca, falko,

birdo heroeca.

Refreno:

Ĉu ne vidis, falko,

knabon preteriri,

knabon preteriri,

pezvundita kugle?

Refreno:

Knabon preteriri,

pezvundita kugle,

pezvundita kugle,

pezvundita kugle?

Refreno:

*Pezvundita kugle,
kugle kaj ponarde!?*

Refreno:

*Magda, kara Magda,
por vi mi forbrulis.*

Refreno:

*Vi inklinu al mi, kara,
min pliamu, kara.
Mi malgajnis pro vi, Magda
jarcenton tutan!*

*Havas vi okulojn
du çerizoj nigraj!*

Refreno:

*Havas vi hararon
de driado blonda.*

Refreno:

*Havas vi staturon
de sireno mara!*

Refreno:

Kuŝas miakore, panjo,
kuŝas miakore,
ho, kuŝas miakore, panjo
insida serpento!

Ne serpento estas, kara panjo,
ne serpento estas,
ho, ne serpento estas,
sed amo al Sevda!

Havas ŝi okulojn nigrajn, kara panjo,
havas ŝi okulojn,
ho, havas ŝi okulojn —
du ĉerizoj nigraj!

Havas ŝi brovetojn, kara panjo,
havas ŝi brovetojn,
ho, havas ŝi brovetojn —
hirundoj maraj.

*Havas ŝi staturon, kara panjo,
havas ŝi staturon
havas ŝi staturon
tute konvenata.*

Popolo makedona

ĉu vi havas idealon?
Estas tempo por vekigo —
kaj rekonsciiĝo!

Aliaj scias pri vi,
vi pri vi ne scias,
vi pri vi ne scias,
hontiga ago!

Kaj en Zagoriĉane
ploras panjoj, infanetoj
pro soldatoj turkaj,
serĉantaj bombojn!

—Karaivanov ni serĉas
kaj ties taĉmenton!
—Melis Karavangelis
en Bitola ĉelo estas!

Bonan nokton vi ne diru, kara,

hejmen ne revenu frue vi.

Ja, plej bona tempo estas

la nokto, kiel tiu ĉi por ni.

Ĉiuj dormas kaj solaj ni estas,

kial ne estas vi ĉe mi —

karesu, kisu senfine,

por amo estas la nokto!

Vi alian amas — scias mi,

vi alian amas — trompas — scias mi.

Estas mia koro nur por vi,

al alia mi ne donos ĝin.

Printempo ne alvenas por mi,

por mi ne floras floretoj;

unua am' por vi mi restas,

kaj la lasta ankaŭ restas vi!

Ne nasku, panjo mia Makedonio,
filinojn tre belegaj.
Filinojn viajn, panjo Makedonio,
forrabas turkaj tiranoj.

Vi nasku, panjo mia Makedonio,
vi nasku, panjo nur filojn,
ke standardojn viajn nun, Makedonio,
super l'popolo flirtigu!

Ke filoj viaj en la montaro
verŝas sian sangon por vi.
La filinoj modestaj kaj belaj
kiel floroj forvelkas!

Vi ne ruĝoŝminku, Mara, ne beliĝu
kaj ne belvestiĝu tiom, Mara,

La najbaroj al mi ridas, Mara,
la najbaroj, Mara, la filistroj.

Kiun ajn estas rigardinta, Mara,
vi al tiu, Mara, vundon faris!

Vundo, kiu daŭras, Mara, ĝis tri tagoj,
mia vundo daŭras jam tri jaroj.

Mi estiĝis, Mara, kiel seka arbo,
mi estiĝis seka arb' acera.

Prenu fajron, Mara, min bruligu,
min bruligu, Mara, min cindrigu!

Vi ne dancu ĉe mi tiom proksime;
brulas mia koro pro vi, ho, Donka!

Refreno:

Ho, mi vin ekamis,
kial mi vin perdis?!

Mi memoras, kiam mi estis soldato,
tiam rondandan kondukis.

Refreno:

Ne trapasis nek unu jaro
je alia vi edziniĝis, Donka.

Refreno:

Ne gravigu vin, karega

*Jovana, Jovanka.
Scias mi devenon vian,
birdeto bunta.*

*Sidu sur genuo mia,
Jovana, Jovanka.
Disbutonu mian veston,
birdeto bunta.*

*Disbutonu mian veston,
Jovana, Jovanka,
kaj ĉemizon mian vidu,
birdeto bunta.*

*Ĝi de kugloj — detruita,
Jovana, Jovanka,
kaj de sango farbita estas
Jovana, Jovanka,
birdeto bunta.*

***Ne forvendu, Koljo, vian bienon,
min por vi ne donas mia patrino!***

Refreno:

*En drinkejojn iras, Koljo,
ŝaŭman vinon drinkas,
hejmen ne revenas, Koljo, por dormi!*

*Mia vizaĝo estas je prezo,
Koljo, de via domobieno!*

Refreno:

*Ne forvendu, Koljo, vian ŝafaron
min por vi ne donas mia patrino!*

Refreno:

*Mia koleto estas je prezo,
Koljo, de via ŝafaro!*

Refreno:

*Ĉu mi ne diris al vi, Donka,
ĉu mi ne diris:
vi ne amu, kara Donka,
fraŭlojn el Bitola?!*

*Ili mensogas, kara Donka,
ili delogas
ĉiam, kara Donka, ĉiam
pro damnita mono!*

*Fraŭloj el urb' Bitola, Donka,
estas ŝercemuloj,
multpromesas, kara Donka,
tamen ne plenumas!*

Vi nudpiede ne iru, kara!

Refreno:

*Ho, vi, Maruša bonanima,
Maruša, bonhumora,
vi mia estis kaj mia estos!*

*Vi nudpiede ne iru frue,
mi diris al vi ne iru sola!*

Refreno:

*Ne iru frue dum estas prujno,
mi diris al vi: ĉe min alvenu!*

Refreno:

*Patrino donas min al vi, kara,
sed patro estas kontraŭe, kara!*

Refreno:

Patrino donas min al vi, sed patro ne!

Kara patrino, ne malbenu kruele,
ke mi estiĝis, kara panjo, alia.

Jungigu vi, patrino, mian ĉevalon.
Mi iros, panjo, al vilaĝo de Blaga.

Se Blaga, kara panjo, estas malsana,
mi min ŝajnigos kiel juna doktoro,
kuracos mi ŝin, panjo, senpage.

Se Blaga, panjo, estas fianĉiniĝita,
mi min ŝajnigos kiel juna buĉisto
kaj mi ŝin, panjo, sabrohakos je pecoj!

Vegetis, elkreskis

*floro bunteta
antaŭ la fraŭlina
eta fenestro.*

*Fraŭlino dumtage
ĝin akvumis,
kaj fraŭlo dumnokte
ĝin forŝtelis.*

*Ho, fraŭlo, ho, fraŭlo
tiom malsaĝa
kial vi ne scias
ami fraŭlinon,
sed scias vi nokte
floron forŝteli?*

*Ho, fraŭlo la floro
estas flarinda
kaj mi, la fraŭlino,
estas aminda!*

Tiun jaron vi edzigu min, patrino,
ektedas al mi jam fraŭleco mia!

Mi preferas, panjo, nian najbarinon,
nian najbarinon, tiun ĉi Mariĉan.

Kiam ŝi ordigas ties korton larĝan,
ties staturo mian koron brulas!

Tiun jaron mi ne povas vin edzigi,
filo, ĉar la jaro estas multekosta!

Ŝvebas nuboj, l'agloj kriegas,
kantas l'Balkano kanton ribelan.
Ĉu fulmotondroj teron ekskuas
aŭ pinoj altaj elradikiĝas.

Nek fulmotondroj teron ekskuas,
nek pinoj altaj elradikiĝas,
sed fagarbaron oni elhakas,
najlojn lignetajn batas en ungojn,
fandas la fornoj pezan ferercon,
forĝas katenojn por makedonoj.

Ĉu estas iu, kiu ne scias
pri nia kara Makedonio?
Ĉu estas iu, kiu ne scias
ĝis kie estas nia Makedonio?

Ŝtip, Kumanovo, Strumica kaj Struga,
tra Gevgelio ĝis urbo Solun,
tie nur gloraj gefratoj vivas,
gloraj gefratoj, nur makedonoj!

*De Bitolo ĝis Vevĉano,
estas blokado.*

Refreno:

*Hura Stavro, la taĉmentestro!
Blokis turka soldatar' Stavron.*

Refreno:

Ne kapitulacias Stavro.

Refreno:

Ne cedis Stavro — fusil' havas.

Refreno:

*La bonbon kiun Stavro ĵetis
dek turkajn soldatojn mortigis.*

Refrreno:

*Kaj fine sin mortigis Stavro
pro patrino — Makedonio.*

De Pirinmontara pinto

*tristega voĉo ŝvebas,
Makedonio ploras:*

*—Vi malbenita estu,
Eŭropo dibuĉula,
Eŭropo Babilona!*

*Italoj, francoj, angloj,
germanoj volas por ni
sklavecon nigran, fratoj!*

*Mi estas el slavaro
je oro plena tero
kaj ĉiuj min envias!*

Mi plene konfuziĝis

pro unu belulin' el Oĥrid.

Mi plene konfuziĝis

pro unu bela, pro unu belulin' el Oĥrid.

Iru vi, patrino olda

kaj sekrete diru al ŝi.

Kaj sekrete,

kaj sekrete diru al ŝi:

—Mia fil' vin amas,

sed li hontas diri al vi.

Mia fil' vin amas,

sed li hontas diri al vi,

sed li hontas,

sed li hontas diri al vi!

—Se li havis amon al mi,

li pli frue devus diri.

Se li havis amon al mi,

li pli frue,

li pli frue devus diri.

Mi alian jam nun mi havas —

unu knabon el Bitolo.

*Mi alian jam nun mi havas —
unu knabon,
unu knabon el Bitolo!*

Brezovo estas en fajro, Makedonio,
Ordan taĉmente eniris, Makedonio.

Kaj al taĉmento parolas, Makedonio,
—levu sin, fratoj, ne dormu Makedonio,
prenu bonbojn kaj kuglojn, Makedonio.

Prenu bonbojn kaj kuglojn, Makedonio,
ni malamikon forpelos, Makedonio.

Bomboj kaj kugloj ektondris,
Ordan subite elkriis:
—Brezovon ni almilitis, Makedonio!

Brilis, brilis la klareca luno,
brilis la klareca luno,
de urb' Solun ĝis Tetovo.

Ne ekbrilis, ne ekbrilis luno,
sed ekbrilis tri edzinoj,
tri edzinoj el Tetovo.

Ili rekte iras al Tetovo,
rekte iras al Tetovo
ĉe l'vendiston onklon Jakim:

—Onklo, bonan tagon, bonan tagon,
bonan tagon, bonan tagon.
Kaj respondas tiu onklo Jakim:
—Bonan tagon, tri edzinoj.

—Donu al ni, donu al ni, onklo
donu al ni, onklo, pudron,
pudron ankaŭ ruĝigilon.

*Niaj edzoj estas eksterlande,
niaj edzoj alveninte,
alveninte, ili pagos!*

Ho, Jana, Jana, Jana, belega!

*De l'unua flanko, Jana, la suno vin brilas,
de l'alía flanko, Jana, la luno vin brilas.
Estis ni malriĉaj, Jana, nun estas ni riĉaj,
sed utilo kia estas je nia riĉaĵo,
kiam infanetojn havas ni, Jana, neniajn!*

*Ĉu tio estas pro mi aŭ pro vi,
ĉu pro Dio estas aŭ pro alia afero.
Estas malbenita mi de l'patrino, karega.
Ties filo Stojan estis patrin' malbeninta. /2*

*Ho, Jana, Jana, bela filino
infaneton, Jana je vi simila ne nasku,
ĉar vi nokte ploras, Jana, kaj tage vi dormas.
Kara Jana, vi al panj' kaŭzigas doloron,
ke ne povas naski vi infaneton, karega! /2*

Ho, Neda, Neda, prenu min vi, ho, Neda.

*Se vi min ne prenos, Neda
vin, hundino, vento prenos,
ĉar vi min malŝatas!*

*Riĉuloj ni ankaŭ estas, kara mia, Neda.
Ni ankaŭ havas grandan riĉaĵon, ho, Neda,
kaj femuraĵon ranan', kara Neda,
musoventreton, Neda, je vino plena.
Ni esperas, Neda, geedziĝon fari;
preni, hundino, vin!*

*Riĉuloj ni ankaŭ estas, Neda, kara mia,
par' da pantalonoj je la naŭaj fratoj;
ĉiufeste ni alternas, por ke alivestu.
Ni esperas, Neda, geedziĝon faru,
preni, hundino, vin!*

Ho, vi, birdo najtingala,
vi, ekkantu unu kanton,
vi, ekkantu unu kanton,
disaŭdiĝu malproksimen.

Disaŭdiĝu malproksimen,
malproksimen ĉirkaŭ Veles,
kaj de Veles ĝis Prilepo,
de Prilepo ĝis Kruŝevo.

De Kruŝevo al monteto,
al monteto Meĉkin Kamen.
L'taĉmentestro Pitu Guli
tie por ni nun batalas.

Ho, vi, ho, vi, gekruŝevanoj,
kial, kial malĝojiĝas,
kial geinfanoj ploras
preter domoj bruligitaj?!

Ordan surverande sidas,
surverande en Brezovo
perbinokle li rigardas,
li rigardas tien reen
kaj ekvidas soldataron.

Ĵetis bombojn en vilaĝon
la vilaĝon li eskuis
kaj dispelis soldataron.

Tiam diris vilaĝanoj:
—Ĉu elfaris tion Ordan,
Ordan nia el Brezovo?

Ordan estas kirasita
kontraŭ malamika kuglo,
kontraŭ malamika sabro!

Kanton mi kantas, makedonoj,
per niaj vortetoj.
Kanton pri Egea ido
de Makedonio.

Refreno:

Ho, makedonino min naskis,
lasis al mi ĵuron:
—Kresku kaj batalu, filo,
por Makedonio! /2

Mi naskis en Kukuŝo,
turmentis min turkoj.
Kruron kaj manon al mi tranĉis,
okulojn eligis.

Refreno:

Sed nomon mian, makedonan
neniel mi ŝanĝos.
Estas al Goce Delĉev
mi nepin' fidela!

Refreno:

Tagiĝas. Kokoj jam kokerikas,

— lasu min, bela Mitra foriri. /2

*La kokerikoj estas mensogaj,
vi kuŝu ĉe mi, bela junulo
kaj kisu mian blankan vizaĝon.*

—L'lignistoj iras al la arbaro,
lasu min, bela Mitra foriri. /2

*Lignistoj niaj iras vespere,
vi kuŝu ĉe mi, bela junulo,
hararon mian milde karesu!*

La birdo kantas frue matenon,

*antaŭ tagiĝo, antaŭ aŭroro,
vi ellitiĝu, mia edzino,
pretigu la ĉevalon por vojo.*

*Rajdante iras mi malproksime,
tre malproksime al eksterlando.*

*Vi mendu, kara mia edzino,
mendaĵon vian: tuj mi elsendos.*

*Ĉu volas monojn vi, aŭ leteron,
aŭ min reveni hejmen vi volas?*

*Nek monon, nek leteron mi volas,
nur vin reveni hejmen mi volas.*

*La mon' perdiĝas, l'leter' ŝiriĝas,
eterne daŭras, kara, nur l'amo!*

Mi vagulo estas.

*L'vojo estas lito,
dormkovrilo, panjo,
kaj sternaĵo.*

*Hieraŭ vespere,
kiam mi ekkuŝis,
kiam mi ekkuŝis,
vidis sonĝon.*

*Ĉe mi kara, panjo,
ĉe staturo mia
dormis unu knabo
tre belega!*

Vi levetu, belulino,
la tuketon,
por ke vidu mi vizaĝon
vian, kara!

Kaj ke vidu vi, junulo,
ne utilas.
La vizaĝo estas, kara,
por alia.

Por alia, mia kara,
por l'najbaro,
por l'najbaro, mia kara,
por Janeto!

Kun du kruĉoj l'knabino

iris al font' por akvo!

*Sekvis ŝin unu knabo,
parolante al knabino:*

*—Haltu, kara, atendu,
vortojn du mi ekdiri.*

*Donu al mi la kruĉon,
akvon volas mi trinki.*

*Ho, ne prenis li l'kruĉon,
sed ŝin kaptis je mano!*

Aŭdu, aŭdu, patriotoj,
kion diras mi al vi:
dum Georgo-festo estis
mi malliberigita.

*Estis malliberigita,
ĉar denunciis min iu,
kiu min spionis, fratoj,
estis li komercisto.*

*Ne inkviziciu min vi,
ĉar mi estas senkulpa.
Mi batalis por libero,
ankaŭ por homaj rajtoj.*

*Se patrino mia sciuz,
tombon por mi elfosoz.
Tombon por mi ŝi elfosoz
kontraŭ tiu sun' klara.*

*Kaj surkruce ŝi enskribos:
"Estas entombigita
Aleksandro tie ĉi,
Aleksandro el Oĥrid!"*

Demandu, Tinka, gepatroj,

ĉu donas ili vin al mi?

—Ankoraŭ mi ne demandis, Gjorgji.

Vespere tamen mi aŭdis,

panjon al paĉjo parolis:

*—Ĉu ni ne povas doni nian Tinkan
al Gjorgji, l'drinkulo?*

Paĉjo al panjo respondis:

*—Kaj naŭ filinojn mi havu,
nek unu al li ne donos.*

Ĉar estas Gjorgji drinkulo.

*Drinkante vinon kaj brandon
pafadas li per pistoloj!*

Trapasis Dimčo, trapasis

preter la domoj ŝafistaj.

Trapasis Dimčo, trapasis

preter la domoj ŝafistaj.

Ekvidis lin, ekvidis

ŝafistaj junaj virinoj.

Ekvidis lin, ekvidis

ŝafistaj junaj virinoj.

Kaj ili diras, parolas:

—Ho, Dimčo, vi surveranden

nun venu drinki brandeton,

nun venu drinki brandeton,

almanĝaj’— blankan fromaĝon!

Kaj Dimčo diras, parolas:

—Ŝafistaj junaj edzinoj,

ne prenu min je animo

ne prenu min je animo!

Mortigos min la ŝafistoj.

Respondas ili al Dimčo:

—Vi venu, Dimčo, veranden

forestas niaj ŝafistoj!

Malsaniĝis juna makedono

*kaj neniŭ venas lin ekvidi
Ho, kompatinda knabo, kompatinda
makedono!*

*Nur venis ĉe lin knabineto,
knabineto ties najbarino,
knabineto kun nigraj okuloj.
Ho, kompatinda knabo, kompatinda
makedono!*

*Ŝi alportis naŭ oliginosojn:
—Prenu tiujn ĉi oliginosojn.
—Ne deziras mi oliginosojn,
ĉar por vi pulsadas mia koro,
knabineto, ho kun nigraj okuloj.*

*Ho, kompatinda knabo, kompatinda
makedono!
Se ni geedziĝos, la doloro*

*en la koro, kara mia, pasos!
Knabineto, ho, kun nigraj okuloj
makedonaj!*

Blankpiedulino vadas

tra rivero eta.

En la mano portas korbon,

plena je fruktaĵoj.

Renkontiĝis sur strateto

knabo kaj knabino.

Ekparolas l'knabineto

al la bela knabo:

*—Ĉu kazernen iras, knabo,
aŭ de tie venas?*

*—Mi ne iras al kazerno,
nek de tie venas.*

Estis mi en novbazaro

kaj ĉevalon trovis.

*—Vi etendu manon, kara,
min surĉevaligu.*

Min surĉevaligu, kara,

hejmen kunkonduku.

Hejmen kunkonduku

en la ĉambbron buntan.

En la ĉambbron buntan,

sur sternaĵo mola!
Vian hejmon mi ŝanĝos,
panjon anstataŭos!

Sur la domtegolo, panjo,
sur la domtegolo
oni donas signon, panjo,
oni donas signon.
Ĉu mi iru, kara panjo,
por malfermi pordon,
ĉar ekstere staras, panjo
knabo mia, panjo
—Vespermanĝon ni ne havas,
ne malfermu, kara!
Vespermanĝon ni ne havas,
ho, kara filino.
Ho, vespermanĝo estos, panjo,
miaj dolĉaj vortoj!
Ho, vespermanĝo estos, panjo,
miaj dolĉaj vortoj!
—Ni sternaĵon nun ne havas,
ne malfermu, kara!
Ho, sternaĵon ni ne havas,
ne malfermu, kara!
Mia belstature, panjo,

estos la sternaĵo.
Ho, mia belstature, panjo,
estos la sternaĵo!

Mi miregas, Cveta, kiel

vi noktumas sola!

*Ho, birdo mia, Cveta, en ĉambro ordita,
ho, ŝafideto, Cveta, en ĉambro ordita!*

Kiel sola vi noktumas

en ĉambro ordita.

*Ho, birdo mia, Cveta, en ĉambro ordita,
ho, ŝafideto, Cveta, en ĉambro ordita!*

Min invitu, kara Cveta,

ĉe vin mi alvenos!

*Ho, birdo mia, Cveta, ĉe vi mi noktumos,
ho, ŝafideto, Cveta, en buŝ' vin mi kisos!*

***Enplantis Jana, panjo, enplantis Jana,**
enplantis Jana, panjo, ocimon fruan,
sed ŝi ne vidis kiel l'ocimo kreskis,
sed ŝi ne vidis kiel l'ocimo kreskis.*

*L'ocimo kreskis, panjo, l'ocimo kreskis
kaj faris ombron por du ŝafaroj, panjo.*

*Survoje venas, panjo, junulo bela,
ocimon fruan volas de Jana, panjo:*

*—Deŝiru vi ocimon, se fraŭlo estas,
se estas vidviĝinta, vi ne deŝiru!*

Reve sidas mi

kaj pensas, Trena.

Ĉiujn kantojn, Trena, mi finkantas.

Per ŝalmetoj ĉiuj mi ekŝalmas

kaj liuto mia min plorigas.

Reve sidas mi

kaj pensas, Trena

pri ĉiuj belulinoj, kara,

pri ĉiuj belulinoj!

Vi ne estas menciinda, Trena.

Ĉiam, kiam, Trena,

vin memoras

plenas mi je larmoj tutan glason

kaj ĉemizon blankan trempas,

miabruste, Trena, ĝin sekigas!

Slatinaj rabistoj enen,
en la monaĥejon venis.
Slatinaj rabistoj enen,
en la monaĥejon venis.

Al l'prioro ili diras:
—Kie estas l'ribeluloj?
Al l'prioro ili diras:
—Kie estas l'ribeluloj?

Kaj respondas la prioro:
—Mi ne konas ribelulojn!
Kaj respondas la prioro:
—Mi ne konas ribelulojn!

Koleriĝis la rabistoj
kaj bruligis l'monaĥejon!
Koleriĝis la rabistoj
kaj bruligis l'monaĥejon!

Ekaperis nigra nubo

en direkto al kampo.

*Ne, ne estis nigra nubo,
estis turkaj kanajloj.*

*Kaj sieĝis la montaron,
la montaron, la vojon.*

*La unua paf' ekpafis
inter Rakle, Nikodin.*

*Kaj dua paf' ekpafis
ie ĉirkaŭ Popadja.*

*Kaj tria paf' ekpafis
ie ĉirkaŭ la Noĵot.*

*Turkoj krias: — Allaĥ, Allaĥ,
Allaĥ, Allaĥ, nederbu!*

*L'ribeluloj krias: — Hura, hura,
hura — Makedonio!*

Ĉe fajrego la ĉambreto brulis, Trena,
la ĉambreto, kalkŝmirita, kara Trena,
kalkŝmirita, blankigita, Trena kara.

Mi ne tristas, kara Trena, pri l'ĉambreto
mi bedaŭras, kara Trena, pri l'tirkesto,
ene estis, kara Trena, la leteroj,
la leteroj, kara Trena, de l'knabin'!

Alkliniĝis, alkliniĝis Ŝar-montaro, kara.

Alkliniĝis, alkliĝinis Ŝar-montaro, kara.

Ĝi alpremis, ĝi alpremis tri ŝafistojn, kara.

Ĝi alpremis, ĝi alpremis tri ŝafistojn, kara.

La ŝafisto unua al ĝi triste petas, kara:

—Vi tralasu min, tralasu min, montaro.

Havas mi edzinon. Ŝi funebros longe, kara.

Havas mi edzinon. Ŝi funebros longe.

La ŝafisto dua al ĝi triste petas, kara:

—Vi tralasu min, tralasu min, montaro,

havas mi fratinton. Ŝi funebros longe, kara.

Havas mi fratinton. Ŝi funebros longe.

La ŝafisto tria al ĝi triste petas, kara:

—Vi tralasu min, tralasu min, montaro,

havas mi patrinon. Ŝi funebros longe, kara.

Havas mi patrinon. Ŝi funebros longe.

La edzin' funebros nur duonan tagon, kara.

La fratin' funebros ĝis la edziniĝo.

La patrin' funebros ĝis la vivofino, kara.

La patrin' funebros ĝis la vivofino!

Kolektiĝis, kolektiĝis la svatantoj,
por ke iru, por ke iru al la novedzino, kara.

Refreno:

Lidu, lidu, lidu du,
rumba, rumba, rumba ba
ĝojas nun la vilaĝo!

Por ke iru, por ke iru al la novedzino, kara.
L'novedzino estas transe de Vardar.

Refreno:

Tamen la rivero Vardar elbordiĝis
kaj forportis, kaj forportis l'junedzinon!

Refreno:

La novedzo ploras por la novedzino,
la svatantoj, la svatantoj — por l'donacoj!

Refreno:

Oni Donkan fianĉinigi,

Tamtamo, tamo, tam, tam,

Donkan, Donkan de Janiĉkovi.

Amasiĝis la najbaroj,

la najbaroj, la amikoj:

—Je feliĉo, kara Donka!

—Vi ne krii: Je feliĉo!

Tamtam, tamo, tam, tam,

sed al patrino diru!

Tamtamo, tamo, tam, tam.

Al la panjo, al la paĉjo.

Ke ne amas mi la fianĉon.

Tamtamo, tamo, tam, tam.

Mi deziras mian amon.

Tamtamo, tamo, tam, tam.

Mian amon, nigran Gjorgji.

Fraton la fratın' invitas por manĝi:

—Vespermanĝi venu, venu, ho, frato.

Vespermanĝu vi, fratino, mi estis
en drinkejo, kie mi vespermanĝis.

En drinkej', fratino, manĝis mi, drinkis
kaj grandegan malbonaĵon mi faris:
mi, fratın', ekbuĉis unu junulon,
sanga elaçeto estas pagenda.

—Vespermanĝi venu, venu, ho, frato,
sangan elaçeton, frato, mi pagos.

La fratino havas, frato, naŭ filojn.
Unu el la filoj nun mi rezignos.

Tutan nokton larme sidas l'patrino,
ke ne scias kiun filon rezigni,
kaj rezignis panjo la plej malgrandan.
Plej malgrandan filon, la plej belegan!

Mi knabinon unu amas.

Tio daŭras sep-ok jarojn.

*Venis tempo mi ŝin prenu, ho, aman, aman,
la knabino malsaniĝis.*

Iris mi knabinon vidi,

iris mi knabinon vidi:

*Ŝi vinberon ekdeziris, ho, aman, aman,
ja vinberon — mezovintre.*

Serĉas mi vinberon vintre,

plenumante la deziron,

*por donaci al l'knabino, ho, aman, aman,
sed ne trovis mi vinberon.*

Kiam mi revenis hejmen,

oni elkondukis tiun.

*Lasu ŝin mi donas ducent, ho, aman, aman,
donas mi tricent ŝin vidi!*

Ĉiuj junulinoj, panjo, edziniĝis,
*prenis la plej belajn junulojn,
sed la plej malgranda mi kaj la plej bela
restis, panjo, mi senfeliĉa.*

*Edziniĝis mi, patrino, por drinkulo
kiu drinkas vinon kaj brandon,
tutajn tagojn ne eliras el drinkejo
drinkas, hurlas ĝis la mateno.*

*Ĉi vespere iras al drinkejo
drinki blankan brandon kaj vinon,
revenante el drinkejo li min batas.
Batas min l'drinkul' malamik'.*

L'junulinoj el Tikveŝo, ho,
blankvinberon plukas,
blankvinberon plukas, panjo, ho,
blankajn monojn prenas.

Blankajn monojn prenas, panjo, ho,
kolieron faras,
kolieron faras, panjo, ho,
kolieron portas.

Kolieron faras, panjo, ho,
la junuloj vidu ilin,
la junuloj vidu ilin,
ilin ekdeziru!

***Najtingalo frue kantas,**
frue antaŭ mateniĝo.*

*Vi, vekigu, ho, junulo
kaj elektu amon!*

*La fajrejon nun fajrigas
la knabin' unua,
l'dua rostas ŝafidaĵon,
l'tria min rigardas!*

Mi descendis en la kelon.

Tie trovis mi l'edzinon.

Tie trovis mi l'edzinon.

Tie trovis mi l'edzinon.

Tie trovis mi l'edzinon,

kun la kruroj al la pordo.

Kun la kruroj al la pordo,

kun la kruroj al la pordo,

buŝe sub la kranfermilo.

Kial guti sur la teron,

kial guti sur la teron,

lasu guti en la buŝon,

lasu guti en la buŝon.

Mi punvergon prenis mane,

mi punvergon prenis mane,

kaj envergis sen kalkuli!

Mi aŭdas kiel la foliaro bruas,

mi aŭdas la foliaron.

Ĝi ploras por l'taĉmentestro, l'kapitano!

Ho, kamaradoj, fidelaj, makedonoj,

vi, kiam tra la vilaĝo iras, karaj,

vi, kiam tra la vilaĝo iras, karaj,

ĉevaloj viaj ne devas hufoklaki.

Ĉevaloj viaj ne devas hufoklaki,

ne devas, ja, hufoklaki

kaj per fusiloj ne devas vi pafadi,

por ke ne aŭdu patrino mia olda,

por ke ne aŭdu patrino mia olda.

Ĉar ŝi komencos demandi nepre por mi:

—Ho, kie estas Kostadin, filo mia,

ho, kie estas Kostadin?

Kostadin, la taĉmentestro, l'kapitano?!

—Ho ve, via filo, patrino, edziĝis.

Makedonino sklavino ties estas!

Mi deziras ĉe vin veni,
por dolĉe mi vespermanĝi
kaj drinki vinon malnovan,
mia karega!

La vetero malboniĝis
kaj eta roso ekrosis,
malvarmeta vento ventis
kaj mi ne povis alveni.

Kuraĝulo vi ne estas,
se vin timigas la roso.
Ĉe mi alvenu vespere,
mia karega!

Mi estas splene naskita,
malĝoje nepre mi mortos.
Vi miajn splenojn enskribu
de mia tombo surkruce.

Mi iros en la montaron,
en la kavernojn mallumajn:
okulojn mi fordifektos,
por ke ne vidu mi sunon.

Mi iros en la kamparon
kaj kuŝos en rozĝardeno
inter la ruĝaj diantoj,
inter la fruaj ocimoj.
Sub tiuj ruĝaj diantoj
deziras morti mi nepre!

Songon vidis, songon vidis

*la edzino de Ordano,
la edzino de Ordano
kaj Ordanon ŝi ekvekis:*

*—Levu, levu vi, Ordano,
en vilaĝo sieĝita!*

*—Vi, ne timu, ho, edzino,
pro sieĝo, ĉar mi havas
nun fusilon ĝustan, kara!*

Doloron havas

*en koro kaj mi mortos
pro amo je Tarpana.*

*Se min vi amas,
bonege estas tio.
Se — ne, vi diru al mi!*

*Mi multajn urbojn
trairis, mia kara,
sed kiel vin ne trovis.*

*Kaj mi revenis,
en tiun Bitolan,
feliçon mian serçi!*

Avo paŝtas la ŝafaron

en Pirin-montaro.

*L'ŝafoj paŝtas sin trankvile
molajn trifoliojn.*

*Tiu avo olda ludas
per ŝalmeto sia.*

*Pri herooj Goce, Jane
la ŝalmet' parolas:*

*—Kie estas nia Jane,
tiu reĝ' Pirina
la standardon makedonan
por liber' flirtigi!*

Sorto mia, nigra sorto,
vi, malfidulino,
kial vi forpelis, sorto,
min tre malproksime,
en la lando nekonata,
ĉe homoj — nehomoj.
Eĉ la suno kaj la luno
estas nekonataj.

Revenigu min, ho, sorto,
ĉe mian patrinon,
por demandi mi ŝin, sorto,
je kio mi pekis,
kial, sorto, ŝi edzinigis
min tre malproksime!?

Kanonoj tondras, ĝemas la tero.

*Flamo atingas ĝis la ĉielo:
malĝoju, miaj fratoj geslavo,
Smilevo estas tute en fajro.*

*Virinoj ploras pri infanaro,
kaŝas sin junulinoj belaj
kaj Dame Gruev estas ĉe frunte
de la taĉmento makedona.*

*Antaŭen, fratoj, kontraŭ la turkoj.
Falas la nigra tiraneco.
Sur tiu reĝlando ni ekzistos
sub tiu vana tiranio.*

Beljunulo iris frue

al la urbo Solun.

Al fraŭlino li parolas:

—Mendu ion al mi.

Mendu, mendu, karulino,

kion mi alportu.

Ĉu vesteton ortekstita,

ĉu kolĉenon oran?

—Vi aĉetu al mi, kara,

laŭ deziro via.

Laŭ deziro via, kara,

al mi ĉio plaĉas!

Havas mi trijaran amon
sen ekscesaj kontraŭdiroj.

Refreno:

Ĉu ne estas kompatinda
mi ekmorti pro vi,
mi ekmorti pro vi, mia kara?

Via panjo kantoj kantas,
mia panjo larmojn verŝas.

Refreno:

Ĉe vi batas la tamburoj,
ĉe ni batas sonoriloj.

Refreno:

Mia lasta vivotago,
estas via nupta tago!

Refreno:

Jam tri jarojn amas

*mi fraŭlinon etan,
fraŭlineton etan,
etan kaj belegan.*

*Per rigard' unua
donis ŝi amegon,
per unua vorto
mian koron vundis.*

*Venu, venu, kara,
soleciĝas ĉiam
en ĝardeno nia,
atendante amon!*

Fartas mi malbone! De tri jaroj

*vi ne venis, Kata, min ekvidi,
vi ne venis, Kata, min ekvidi,
nek alportis, Kata ion al mi:*

*Nek akvomelonon vintran, Kata,
nek akvomelonon vintran, Kata,
nek someran cidonion, Kata,
nek someran cidonion, Kata!*

*Bone faris, ke vi nun alvenis,
vi malfermu fenestreton mian,
vi malfermu fenestreton mian,
por ke vidu vi la lagon, kara.*

*Vidu la ondiĝon en la lago:
Kiel ludas la ondetoj longaj,
tiel ludas, Kata, mia koro,
mia koro por vi, kara mia!*

L'eksterlando malbenita estu.

*Ĝi disigis min dis de l'amato,
ĝi disigis min dis de l'amato,
kiun mi tri jarojn arde amis.*

*La gastlaboristoj jam alvenis,
nur amato mia ne revenis.
Mi atendas lin antaŭ la sojlo,
nur pri li mi pensas kaj mi ploras.*

*Mi demandas vin, gastlaboristoj:
—Ĉu amaton mian vi ne vidis,
ĉu amaton mian vi ne vidis,
ĉu el eksterlando li revenas.*

*Je la jaro tria li leteron
al mi sendis, ene min sciigas,
ke reveni hejmen li ne povas,
ĉar li je alia edziĝis!*

Ne scias, panjo mi kiel

*Liljanan havi por ĉiam,
Liljana bela fraŭlino,
Liljana blanka kaj ruĝa,
Liljana fajna kaj alta,
Liljana frua ocimo,
Liljana floro bundeta,
Liljana — unu je panjo!*

*Vi, kara filo, nun sciu:
—Vi mastrojn tricent nun voku
kaj fontoŝtonon vi faru
por pura akvo malvarma.
La vilaĝanoj alvenos
kaj la fraŭlinoj vilaĝaj,
la junedzinoj vilaĝaj
kaj eble venos Liljana.*

*Konsentis Stojan kun panjo
kaj fontoŝtonon ekfaris
por pura akvo malvarma.*

*Kaj venis ĉiuj por akvo —
l'fraŭlinoj kaj l'junedzinoj,
ne venis hundin' Liljana!*

Pereas, kara avino, tiu Gjorgji
por unu glaso da brando.

Ne mortas, kara avino, tiu Gjorgji
pro io, sed pro brandeto.

Kaj ĉion, kion li vidas, kara mia,
deziras kiel propraĵo.

Kaj se kokidon li vidas, kara mia,
deziras kiel propraĵo.

Kaj se bovidojn li vidas, kara mia,
deziras kiel propraĵo.

Se junedzinon li vidas, kara mia,
deziras kiel propraĵo.

Fatecon nigran ekhavis

*Turunĝe, la taĉmentestro.
Li dekse jarojn ribelis,
je la deksepa lin kaptis
la turkoj pro denunciŝto —
lin Dio murdi kaj estu
ĉiam li malbenata —
li, Mitro, la denunciŝto.*

*Perfidis li la taĉmentestron
pro centkvindek ormoneroj.
Kaj la denunciŝta Turunĝe
enfalis en la kaptilo.*

*Kaj turkoj metis lin enen,
en l'nigran malliberejon,
je manoj — pezaj katenoj,
je kolo — etaj ĉeneroj.*

*Kaj estis li pendumita
sur urba strato komerca.*

*Bitola ekploris pro li,
pro Aleksandro Turunĝe!*

Disiĝas disde patrino

fraŭlino — arbo ĉeriza:

*—Pardonu, panjo, pardonu,
pardonu, karaj parencoj,
pardonu, karaj parencoj
pro mia kulpo antaŭ vi.*

*Ĝis nun al panj' mi subiĝis,
de nun — al mia bopanjo,
ankoraŭ al bofratinoj,
kaj eta mia bofrato!*

Kion faru, kara mia,
malbona estas patrino:
ne permesas al mi, kara,
ekami bonan junulon.

Vi kontentu per ĉi tio
kion donas mia panjo.
Mia panjo donas, kara,
dotajon — tutajn tri kestojn.

Vi kontentu per ĉi tio,
kion donas mia paĉjo.
Mia paĉjo donas, kara,
pli ol tricentoj da moneroj.

Ne ekdeziregu tion,
ho, filino, mia kara,
per sopiro kaj per ĝemo
forĝemas ofte la homoj!

Ĉevalon selis, ĉevalon selis

Dimitro. Kien vi iras, kara?

*Mi iras, kara Marija, mi iras
tre malproksiman fremdlandon, kara.*

*Karulo mia, Dimitro, kial
pli frue — tri tagoj vi ne diris?*

*Mi estus ankaŭ kun vi irinta,
kiel fidela gardisto, kara.*

*Vi restu tie ĉi, karulino,
kun mi ne iru, kun mi ne iru.*

*Tie malbonaj gardistoj estas,
ekmurdos ili min, karulino,
pro ĉarmo via, pro ĉarmo via,
ĉar estas ili ĝuamaj, kara!*

Estas por mi plezurego
vendejon havi en Struga.

Refreno:

*Ho, mia amo, ho karulino,
vi brulis mian koron, fraŭlino!
Ho, mia amo, ho, karulino,
pereis, mortis mi pro vi, pro vi!*

*Je fenestreto mi sidu
rigardu strugajn fraŭlinojn,
rigardu strugajn fraŭlinojn,
kiel de akvo revenas.*

Refreno:

*Kiel de akvo revenas,
portante kruĉojn buntetajn!*

Refreno:

Estas por mi plezurego, ho, aman, aman!

*Estas por mi plezurego,
vendejon havi en Kojnik, aman, aman!
Vendejon havi en Kojnik.*

*Rigardi ties fraŭlinojn, ho aman, aman!
Kojnikajn belajn fraŭlinojn, ho aman,
kojnikajn kaj bazunikajn, ho aman,
kojnikajn kaj bazunikajn.*

*Dume papavorikolto, ho, aman
Dume papavorikolto.
Ĉe Petro Vitanĉev, aman,
ĉe Ivano de Spasevi.*

*Ĉe Petro ĉiam laboras, aman, aman,
fraŭlinoj junaj belegaj.
Ĉe Ivan ĉiam laboras, aman, aman
avinoj oldaj malbelaj!*

NOMVORTARO

*al la Esperanto-parto de la kantaro MAKEDONAJ PER-
LOJ, cent kvindek popolaj kantoj*

I. Inaj nomoj

Anga, Angelina, Anta

Blaga

Dafina, Dana, Dona, Donka

Evgenija, Elena

Ilina, Ilka

Jana, Jovana, Jovanka

Kalina, Katina, Kata, Kita

Lena, Lina, Liljana

Mara, Mariĉa, Marika, Marija, Magda, Magdalena,

Milka, Milica, Mitra

Nevena, Neda

Rajna

Sevda, Spasija, Stana

Tinka, Trena, Todorka, Tarpana

Vasa, Vasilikija

II. Viraj nomoj

Dame Gruev — nacirevoluciulo
Dimčo, Dončo
Goce Delčev — fama nacirevoluciulo
Georgi, Gjorgji
Ilija, Iljo, Ivano
Jane Sandanski — nacirevoluciulo
Janičkovi
Karavangelis (Karaivanov) — ribelulo
Mile Pop-Ordanov — ribelulo
Nikola Karev — prezidento de la Unua makedona
respubliko (1903)
Ordan,
Pitu Guli — fama revoluciulo
Spiro, Stojan, Spasevi, Stavro
Selim — turka nomo
Turunĝe — ribelulo
Vitančev

III. Geografiaj nomoj

Bitola
Bazunik
Brezovo — vilaĝo
Buzan
Edrine = Edirne — urbo en Orienttrakio (Eŭropa
Turkio)

Kojnik
Kriva Reka
Kumanovo
Mogila — vilaĝo
Nikodin — vilaĝo
Noĵot — montara pinto
Oĥrid
Pirin — montaro
Popadija — vilaĝo
Prilepo
Rakle — vilaĝo
Solun — urbo en Egea Makedonio
Struga
Strumica
Ŝtip
Ŝar — montaro
Zagoriĉane

IV. Kaj ceteraj

nederbu — kie vi estas (Allah)
lidu, lidu du (onomatopeo)
rum-dum-dum (onomatopeo)
rumba, rumba ba (onomatopeo)
tamtamo, tamo, tam (onomatopeo)

Enhavo

| | |
|-----------------------------------|----|
| Enkonduko | 3 |
| Enkondukvortoj de la tradukisto | 5 |
| Mesaĝo venis, Donka, el l'kastel' | 6 |
| El Mogil' mesaĝ' cirkulas | 7 |
| Ho, ekmuziku, muzikistoj | 8 |
| Ni deiru, ho, kara Vasa | 9 |
| Nun ĉu vi scias, memoras, Milica? | 10 |
| Kara Milka ni forlasu | 11 |
| Sin pretigas, kara panjo | 12 |
| Ĉu aŭskultas vi nun, Anĝa belega | 14 |
| Anica, trista animo | 15 |
| Belulinon amas mi | 17 |
| Biljana tolon blankigis | 18 |
| Bitola | 19 |
| Bitola, nur en Bitola | 20 |
| Dio punu tiun, kiu | 21 |
| Dio murdu, panjo, dio murdu | 22 |
| Gjorgji la rabist' malsanas | 23 |
| Nun malsanas juna Stojan | 24 |
| Mile Pop-Ordanov malsana kuŝas; | 26 |
| Plantis pinon juna Evgenija | 27 |
| Ŝiris frambojn fraŭlino | 29 |
| Vinon drinkas mi kaj brandon. | 31 |
| Nun ĉevalon rajdas mi | 32 |
| Forkaptis fiaj turkoj | 33 |
| Masonis klostron Ilija. | 34 |
| Ĉiam estu vi, patrino, malbenita | 35 |
| Da fina vino ruĝkolora | 36 |

| | |
|---------------------------------------|----|
| Vi parolis, kara: | 37 |
| Donu min, patrino kara, donu min | 38 |
| Vi, senprudentaj jaroj junulaj | 39 |
| Fraŭlineto, fraŭlineto, | 40 |
| Ĝis kiam, fratoj, karaj makedonoj: | 42 |
| Endormiĝas mi, patrino kara | 43 |
| Unu etfraŭlino | 45 |
| Ho, fraŭlino, etfraŭlino | 46 |
| Elena, ido, Elena | 48 |
| Kiam mi fraŭlo estis, panjo | 49 |
| Edzigu min, kara panjo | 50 |
| Kial lumradias, Dana, vizaĝe | 51 |
| Jam subiras suno klara | 52 |
| Adiaŭ, patrino kara | 53 |
| Kial vi, patrino, kial vi min naskis? | 54 |
| Mezvilaĝe — tamburfrapoj | 55 |
| Vi eliru, olda panjo | 56 |
| Jana, vi amata, Jana, vi amata | 58 |
| Sendis mi por klara akvo vin, Kalina. | 59 |
| Jovana, Jovanka | 61 |
| Diru, Jana, diru, koro | 62 |
| Al mi, Katinka, vi diru | 64 |
| Diru, Rajna, diru, koro | 65 |
| Diru, diru, Stana, kial | 66 |
| Vi nudpiede rikolti | 67 |
| Kiel tiu glaso estas plena je vino, | 68 |
| Diantino, fraŭlino kara | 69 |
| Kata, belstatura, Kata | 71 |
| Vi, alilandano, kara | 72 |
| Kiam falis pezvundita | 73 |
| Kiam beliĝis vi, junedzino | 75 |
| Ironte mi al fremdlando | 77 |
| Kantas mi, pensas aliaj | 78 |
| Ĉe Vardaro ŝi sidis | 79 |

| | |
|-----------------------------------|-----|
| El Kruŝejo alvenis | 80 |
| Vi mensogu, Vera | 81 |
| Malsanas Elena | 83 |
| Lena skribas, Lena skribas | 84 |
| Liljana, kara Liljana | 85 |
| Knabino bela Liljana | 87 |
| Ho, Lina, belega karulino | 88 |
| Vartis Jana infanon | 89 |
| Gejunuloj amis sin longe | 90 |
| Makedona knabino — makedonino | 91 |
| Kiu je pordo frapfrapas? | 92 |
| Mariĉa, belega knabino | 93 |
| Ho vi Marija, bela Marija | 95 |
| Marika bela knabino | 96 |
| Kun tri ŝarĝoveturiloj | 97 |
| Kial naskis vi min, panjo | 99 |
| Dronigita estas nia | 100 |
| Laca falko trinkas | 102 |
| Magda, kara Magda | 104 |
| Kuŝas miakore, panjo | 105 |
| Popolo makedona | 107 |
| Bonan nokton vi ne diru, kara | 108 |
| Ne nasku, panjo mia Makedonio | 109 |
| Vi ne ruĝoŝminku, Mara, ne beliĝu | 110 |
| Vi ne dancu ĉe mi tiom proksime; | 111 |
| Ne gravigu vin, karega | 112 |
| Ne forvendu, Koljo, vian bienon | 113 |
| Ĉu mi ne diris al vi, Donka | 114 |
| Vi nudpiede ne iru, kara! | 115 |
| Kara patrino, ne malbenu kruele | 116 |
| Vegetis, elkreskis | 117 |
| Tiun jaron vi edzigu min, patrino | 118 |
| Ŝvebas nuboj, l'agloj kriegas | 119 |
| De Bitolo ĝis Vevĉano | 120 |
| De Pirinmontara pinto | 121 |

| | |
|-------------------------------------------|-----|
| Mi plene konfuziĝis | 122 |
| Brezovo estas en fajro, Makedonio | 124 |
| Brilis, brilis la klareca luno | 125 |
| Ho, Jana, Jana, Jana, belega! | 127 |
| Ho, Neda, Neda, prenu min vi, ho, Neda. | 128 |
| Ho, vi, birdo najtingala | 129 |
| Ordan surverande sidas | 130 |
| Kanton mi kantas, makedonoj | 131 |
| Tagiĝas. Kokoj jam kokerikas | 132 |
| La birdo kantas frue matenon | 133 |
| Mi vagulo estas. | 134 |
| Vi levetu, belulino | 135 |
| Kun du kruĉoj l'knabino | 136 |
| Aŭdu, aŭdu, patriotoj | 137 |
| Demandu, Tinka, gepatroj | 139 |
| Trapasis Dimĉo, trapasis | 140 |
| Malsaniĝis juna makedono | 141 |
| Blankpiedulino vadas | 143 |
| Sur la domtegolo, panjo | 145 |
| Mi miregas, Cveta, kiel | 147 |
| Enplantis Jana, panjo, enplantis Jana | 148 |
| Reve sidas mi | 149 |
| Slatinaj rabistoj enen | 150 |
| Ekaperis nigra nuboj | 151 |
| Ĉe fajrego la ĉambreto brulis, Trena | 152 |
| Alkliniĝis, alkliniĝis Ŝar-montaro, kara. | 153 |
| Kolektiĝis, kolektiĝis la svatantoj | 155 |
| Oni Donkan fianĉinigi | 156 |
| Fraton la fratin' invitas por manĝi: | 157 |
| Mi kanabinon unu amas. | 158 |
| Ĉiuj junulinoj, panjo, edziniĝis | 159 |
| L'junulinoj el Tikveŝo, ho | 160 |
| Najtingalo frue kantas | 161 |
| Mi descendis en la kelon. | 162 |
| Mi aŭdas kiel la foliaro bruas | 163 |

| | |
|-----------------------------------------|-----|
| Mi deziras ĉe vin veni | 164 |
| Mi estas splene naskita | 165 |
| Songon vidis, songon vidis | 166 |
| Doloron havas | 167 |
| Avo paŝtas la ŝafaron | 168 |
| Sorto mia, nigra sorto | 169 |
| Kanonoj tondras, ĝemas la tero. | 170 |
| Beljunulo iris frue | 171 |
| Havas mi trijaran amon | 172 |
| Jam tri jarojn amas | 173 |
| Fartas mi malbone! De tri jaroj | 174 |
| L'eksterlando malbenita estu. | 175 |
| Ne scias, panjo mi kiel | 176 |
| Pereas, kara avino, tiu Gjorgji | 178 |
| Fatecon nigran ekhavis | 179 |
| Disiĝas disde patrino | 181 |
| Kion faru, kara mia | 182 |
| Ĉevalon selis, ĉevalon selis | 183 |
| Estas por mi plezurego | 184 |
| Estas por mi plezurego, ho, aman, aman! | 185 |
| Nomvortaro | 186 |

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-147-X